11. Feb. 1931

M 1c Paul Gottgetreu, Herrenstr. 12



7-a JARO, N-o 332

LEIPZIG, 12 / 2. 1931

2209 b

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS SEMAJNE | REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris 12e. – GVIDANTO: E. Lanti. – SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. – ADMINISTREJO: R. Lerhner, Kolmstrasse 1, Leipzig O 27 (Germanio). | APERAS SEMAJNE


LIBERTEMPA VOJAĜO EN FAŜISMUJON

Kiel laboristo povus pli oportune eluzi sian mallongan libertempon ol per vojaĝo en fremdajn landojn por konatiĝi kun aliaj popoloj k ties vivkondiĉoj, por studi alilandajn cirkonstancojn k politikon? Veturi en landon de l' konstruota socialismo, en Sovetion, kiel multaj, ja ĉiuj el ni dezirus, pro la troa distanco bedaŭrinde estas maleble. Sed ekzistas pure kontraŭsocialisma lando, kiu ne pli malmulte interesas proletojn: Italio — k tien vojaĝi ni decidis.

Ĉe la limo nia unua rigardo trafis amason da soldatoj, ĝendarmoj, armitaj faŝistoj: ni estis en lando de militistarego. Oni kontrolis niajn pasportojn, traserĉis nian pakaĵaron k ni enpaŝis Italion, kiun ni nur post du semajnoj forlasis. Dum tiuj du semajnoj ni tramigris la belegan montaron de la "Dolomitoj", vizitis Venecion, parolis kun italaj laboristoj k iom observis la faŝisman regadon. Nin ravis la belo de regionoj, kiujn ĝenerale nur vidas riĉuloj. Aŭtomobiloj, luksaj hoteloj, muziko, pompaj marfestoj — ĉio tie servas por malmultaj homoj k pro tio samtempe armeo da proletoj devas laboregi en fabrikaj karceroj.

Sur la altaj montoj oni emas ekforgesi la mizeron de la urboj, oni admiras la pejzaĝon, ripozas, revadas. Kutime oni sur montpinto enskribas en libreto sian nomon, naciecon ktp. Tiuokaze ni kelkfoje rimarkis la literojn SAT k unue miris pri tio, sed ili signifas "Società degli Alpinisti Tridentini" (Societo de Alpturistoj Tridentinaj). Do ekzistas ankaŭ aliaj "SAT"-anoj en la mondo. Ni ne preterlasis la okazon, protesti kontraŭ la faŝismon k enskribis itallingve "Vivu la socialismo!", "Vivu Mateoti!", eĉ sur la plej alta dolomitmonto "Marmolata".

En la montaro ankoraŭ ĉie estas konservitaj postsignoj de l' milito: tranĉeoj, pikdrataj bariloj, grenadaj splitoj, kartoĉoj, eĉ putriĝintaj uniformoj k ŝuoj. Kelklóke oni renkontas pafdetruitajn kabanojn aŭ jam rekonstruitajn novajn. Vespere alvenas montgrimpantoj la kabanojn, manĝas, amuziĝas, trinkas ruĝan vinon k eble — volas kanti. Sed, ho ve, en la gastejoj estas *malpermesite* kanti (ni vidis surskribojn) k se foje iu gastejestro escepte toleras kantadon, li nepre ne permesas iajn *germanajn* kantojn. Turistoj el *Bocen* (Bozen) kantis en kabano, sed la kabanestro, kvankam mem germano, ĉesigis ilin[1]. Mi ja bedaŭras, li diris, sed povus preteriri italo . . . Tio estas la faŝismo.



La Itala Malliberejo

Tamen ni alifoje eĉ kantis esperant-lingve la rusan Volga-kanton "Ruĝa flamo" k oni aplaŭdis nin, ĉar neniu konis tekston aŭ melodion. Oni rakontis al ni, ke germanaj junuloj ĉiudimanĉe suriras montojn k tie kantadas, ĉar en la urbo ili ne havas okazon por tio. Gepatroj mem instruas siajn infanojn germane; eĉ ne ekzistas privataj germanaj lernejoj k la registaro ankaŭ provis malpermesi germane preĝi. Sed kiu protestis kontraŭ *tiaj* persekutoj de nacia konfeso?

Kion alian povas konstati vojaĝanto pri la faŝisma reĝimo? En ĉiuj publikaj ejoj pendas bildoj de Musolini, ĉie oni vidas gardostari "nigraĉemizulojn" k multaj civilpersonoj portas faŝisman insignon. Estas ja la solvo de l' senlaboreca problemo en Italio, ke tiu nombro da homoj, kiu estus senlabora, surhavas faŝisman uniformon. Per tio la ŝtato edukas obeulojn k ŝparas subvenciojn. Mi parolis kun fervojisto, kiu diris, ke oni ne devigas laboristojn aliĝi al la faŝisma partio aŭ sindikatoj; fakte la pli maljunaj *ne aliĝis*, sed precipe junuloj. Fervojistoj estas la plej bone pagataj (monate 1000 liroj), speciallaboristoj perlaboras 30 lirojn tage. Sed la amaso konsistas el helplaboristoj k ili ricevas pli malmulte. Ankaŭ ekzistas monsubteno por senlaboruloj, kompreneble tre modera, 5 liroj tage. (La vivkostoj postulas 20—30 lirojn tage.) Tamen la registaro time konsideras la kreskon de senlaboreco k ĉie aranĝas publikajn laborojn (kanaligo en urboj, konstruado de akvofortaj fabrikoj), nur por laborigi proletojn k eviti ties malkontentiĝon. Kiel oni diris al mi, kelkaj tiaj laboroj estas eĉ malnecesaj,

[1] Italio aneksis post la milito la aŭstrian provincon Sud-Tirolio, kie loĝas 120 000 germanoj. La itala reĝo promesis aŭtonomion al tiu provinco, sed poste la faŝistoj subpremis la germanojn, fermis ĉiujn germanajn lernejojn ktp. Apelacioj al la Ligo de la Nacioj restis senrezultaj.

supraĵe organizitaj ktp. En sudaj landoj laboristoj ja estas tre modestaj, ne konas pretendojn — jen laboras kelkajn tagojn k jen ripozadas sub la varma, reviga ĉielo... Alia klimato, alia kulturo.

Travojaĝante Italion, oni ofte demandas sin, de kie la faŝismo ĉerpas la kostojn por sia perforta, subprema sistemo — k la solvo de tiu enigmo estas, ke oni treege surŝarĝas la popolon per multspecaj impostoj. Se oni konsumas en gastejo glason da vino, se oni aĉetas ian ajn objekton, oni pagas imposton. Ekzistas sennombraj specialaj impostoj por alumetoj, por pianoj, eĉ por loĝejfenestroj k florornamo. Kritiko ja estas malebla k la regantoj povas laŭplaĉe fari financan politikon. Gazetoj estas nur tolerataj, se ili plenlaŭdas la registaron, opozicio tute mankas. Germanaj ĵurnaloj nur rajtas raporti pri tio, kio jam estas presita en italaj gazetoj. Estas malpermesite, kunporti eksterlandajn gazetojn, escepte la plej reakciemajn. Tamen socialistaj gazetoj sekrete cirkulas tra la lando... En Venecio mi vidis en elmontrejo la libron "En okcidento nenio nova" de *Remark* (Remarque), sed germanlingve. La itala eldono estis konfiskata; oni verŝajne opinias, ke scipovantoj de la germana lingvo ne estas politike danĝeraj.

Malgraŭ sia malkaŝa teroro la faŝismo ne kuraĝas konfesi sian laboristkontraŭecon. Ĝi eĉ ne ĝenas sin, nomi sin "La Italio de libero k laboro", kiujn vortojn mi fakte legis sur dekreto por komunuma konsilanto. La sola merito de la faŝismo estas, ke ĝi forigis la tipan italan malordemon, ke nun la fervojoj trafikas akurate k. s. La faŝismo estas la lasta elturniĝo de la kapitalista klaso antaŭ sia detruiĝo, la malespera rimedo por eviti aŭ almenaŭ prokrasti la decidan klasbatalon, ĝi aspektas kiel kvazaŭa socialismaĉo en kapitalisma formo. Sed la eksperimentantoj ne forgesu tion: Ju pli perforte iu regaĉa sistemo subpremas la proletaron, des pli facile povas eksplodi ribeloj; ju pli firme la potenco koncentriĝas en la manoj de l' burĝaro, des pli subite k neatendite ĝi eble foje transiĝos en tiujn de atakanta laboristaro.

F. S. (16 462).

Hispanio — ĝia evoluo de 1923 ĝis hodiaŭ

(2. daŭrigo. Vd. n-ojn 327, 330.)

Agoj de la diktator-kontraŭuloj

La studentoj. La plejmulto de l' studentaro, preskaŭ ĉiuj, estas burĝidoj. Ili ne silentis pri la agado de l' diktatoro. Ili kuraĝe protestis k ofte striketis pro la ekzilado al plej bonaj profesoroj; protestis kontraŭ la enkonduko de nova religia studplano. Sed la diktatoro tute ne volis aŭdi tiajn protestojn; li silentis senhonte k plenumis siajn planojn. Tion vidante la studentoj unuiĝis k fondis revolucieman organizon. Tion malŝatis la diktatoro, kiu ekagis kontraŭ la studentaro, ekzilante la prezidanton de ilia asocio. Tiam disiĝis la studentoj; laŭdis Primon de Rivera la katolikaj elementoj, dum la revoluciemaj striketadis k ofte elpendigis ruĝan flagon sur la tegmento de l' centra universitato.

La laboristoj. Inter la laboristaro pligrandiĝis la malsato. La ekonomiaj komisionoj diskutadis, sed ia sukceso rilate al salajra plialtigo neniam estis atingata. La malkontento kreskis iom post iom. La laboristoj malaprobe rilatis al tiu sub la nova reĝimo kreita organizo, en kiu samnombre estis reprezentitaj mastroj k laboristoj, kiu devus malebligi strikadon (vd. n-on 330). Ili ekstrikis malgraŭ la pafiloj de la civil-gvardio, malgraŭ konsiloj al pacemo de socialistoj, kies paroloj ne kuraĝigis al batalo.

La ĵurnaloj tute ne rajtis paroli pri strikoj aŭ aliaj revoluciaj konfliktoj; severega cenzuro malpermesis informi pri tiaj okazoj. Tamen en nordaj regionoj, ĉe minejoj, okazis strikoj de plurmonata daŭro. Poste plivastiĝis la strik-regionoj, k strikoj etendiĝis tra la tuta lando; ofte tiuj bataloj havis videble politikan karakteron. La situacio fariĝis pli k pli revoluciema.

Mezklasanoj k burĝoj. Ankaŭ la meza klaso troviĝanta en neenviinda situacio elmontris jam sian malamon al la diktatoreco. Dum la unuaj monatoj de ĝia regado ĝi laŭdegadis la diktatorajn agojn, tial ke Primo kuraĝis fermi la revoluciemajn sindikatojn ktp., sed ĝi konvinkiĝis lastatempe, ke ĝia vivnivelo konstante, senhalte plimalaltiĝas. Ĝi vidis ankaŭ, kiel kreskis la polic-salajroj, kiel la armitaj institucioj estis plinombrigataj, por kiu ĝi, la etburĝaro, estis devigata elspezadi impostmonojn plialtigitajn de tempo al tempo. Tiel ankaŭ la mezklasanoj estis ŝovataj pli k pli en la vicojn de l' proletaro.

La situacio estas tamen pli komplika pro tio, ke inter la samklasanoj ne regas unuanimeco. Ofte ili estas malsampensantoj, kvankam la celo estas la sama, tiel en la proletaj medioj kiel ĉe la burĝoj. La fundajn kaŭzojn de tiu malamikiĝo mi ne kapablas malkovri: ĉu estas pro malsama edukado, ĉu pro malsama spirita disvolviĝo, ĉu pro malsama vivmaniero? Mi nur konstatas la fakton de l' interbataloj inter ŝajnfratoj. —

Efika kontraŭdiktatora aganto estis Sanchez-Guerra, iama prezidanto ministrara k ĉiama konservativulo. Li estis ĉefo de revolucia movado kontraŭ la diktatoro. Kune kun artilerianoj li preparis k organizis tiun movadon, kiu estis frakasata en la jaro 1929. Sanchez-Guerra estis kaptita, kiam li vojaĝis per ŝipo al Valencio, por tie ekflamigi la ribelon.

Ŝajnas neeble, ke nur kelkaj ĉefoj k oficiroj de la armeo propravole pretigis sin por agi kontraŭ la diktatoreco, tial ke la diktatoroj certe leĝdonis favore al siaj samklasanoj. Sed tiuj malkontentuloj klare komprenis, ke la diktatoreco estis konstruita kiel luksa domo, por momenta ekbrilo k sen firma fundamento. Ili do antaŭvidis ĝian neprokrasteblan detruiĝon, kies konsekvencoj estus netakseblaj.

Aliflanke, Primo de Rivera akiris tutlandan famon pro siaj preskaŭ ĉiutagaj diboĉadoj. Ofte li aranĝis noktfestojn en la militministerio, kien li invitis amase virinojn, kie oni dancadis k trinkadis senlime k el kie la geriĉuloj foriris frumatene en plene ebria stato, dum la cetera loĝantaro de l' lando suferadis k sufokiĝis en mizerego ne trovante solvon. (Finota.)

. . . iom pli da objektiveco[1]

(Al K-do 15 430)

Pri N. K. L. (rev. sindikataro) K-do 15 430 evidente malmulte scias, ĉar li diras, ke "ĝi mortis en la jaro 1923 pro la influoj de l' anarkistaj teorioj". Ĉu vi ne scias, K-do, ke N.K.L.-on fondis la anarkistoj en jaro 1910? Kiel do, se ĝi ĉiam havis anarkistan tendencon k havas brilegan historion, laŭ viaj propraj diroj, ĝi mortis en jaro 1923 pro tiu tendenco? Ne, K-do: N.K.L. mortis en 1923 pro la diktatoreco; vi mem tion jam diras en via artikolo! "La diktatoro(j) agis laŭ siaj promesoj k baldaŭ estis malleĝigataj la sindikatoj aligitaj al la N.K.L. . . ."

Nun unu rimarkigo rilate al la artikolo de SAT-ano 15 043 (en n-o 319): Ĉi tiu K-do ne parolas pri N.K.L. en jaro 1923, sed pri la stato de tiu organizo en 1930, kvazaŭ la anarko-sindikatistoj k la respublikanoj el "Respublika Frateco" "laboras sekrete por disigi k forteni la nekonsciajn proletojn de l' sindikato . . ." Se kelkaj anarko-sindikatistoj, tion faris, tio samsignifas, kiel se iu liberpensulo agus kiel iu fervora katoliko: li povus *nomi* sin liberpensulo, sed ne estus tia . . .

14 884.

[1] Vd. n-on 327 de "S-ulo".

KUN TIU ĈI NUMERO ESTAS EKSPEDATA "LA LERNANTO"

LA KOLEKTIVIGO EN U.S.S.R. LAŬ FEDOR GLADKOV

(2. daŭrigo. Vd. n-ojn 330, 331)

Malfortaj Punktoj

Kiaj kotaj kavaĵoj, kiaj danĝeroj malhelpas la normalan kreskadon de kolektivig-movado? Kiaj estas la malsanoj, kiuj diserigas la organismon de tiuj ekonomiaj asocioj?

Jen estas maltrankviligaj demandoj, kiuj necesigas tujan k realistan solvon. Se decidigaj rimedoj ne estas alprenataj kontraŭ tiuj malbonoj, se oni ne batalas obstine kontraŭ la danĝeroj, kiuj pendas super la kolektiva ekonomio, se oni estas indiferenta al la afero, ni baldaŭ konstatos la diseriĝon de la kolĥozoj, eĉ de la plej solidaj k maturaj.

Necesas, unue, koncentrigi sian atenton sur la labororganizadon. En la kolĥozoj de la norda Kubano ĝenerale mankas la laboro laŭ vicaj grupoj. La "brigadoj" eklaboras kiel brutaroj, k ili restas ĉe la tasko de l' antaŭkrepusko ĝis la matenruĝo.

Estas multaj laboristoj, tamen la produktokvanto estas sensignifa. La homoj, dum la laboro, sin embarasas k sin malhelpas unu la alian. La troaĵo je manlaboristoj sekvigas malegalan interdividon de la tasko.

Multe da mallaboremuloj senkuraĝigas la aliajn. Multaj estas tiuj, kiuj ne iras al la laboro, drinkas, erarvagas en la *stanico*, suferas sub la influo de malamikaj elementoj. Inter tiuj senokupuloj k tiuj drinkuloj rekrutiĝas ĉiuj fuŝuloj: bruligantoj, kriegemuloj, volontuloj por noktaj atencoj kontraŭ la agemaj aktivuloj; ili estas la nekonataj krimuloj, kiuj ĵetas ŝtonojn en la rulaĵojn de la draŝiloj, stumpigas la ĉevalojn k frakasas la maŝinojn. Kiam ekzistos la interpartigo de la tasko po laboristgrupetoj, firma k rigore kalkulata interpartigo, la kontrolo super tiuj homoj estos facila k vigle atenta; la disciplino estos observata sufiĉe neŝanceleble.

Kompense, tiu tuta malordo, tiu tuta neinterligita interpuŝiĝo rezultigas, ke la labordisciplino estas multege tro malsevera. Ĉio iras laŭ sia propra impulso, sendirekte. Se oni encerbigas al si forlasi la laboron, oni senzorge ĉesas k oni foriras hejmen; krioj de brigadestroj k de la delegitoj ne sukcesas rekomencigi la laboron. Kaj oni miras: sed kial, tiuj homoj laboras tamen? Kio kunligas ilin al la maŝino? Ĉu ne estas la sezona instinkto de la plugisto? Tiu supozo kaŭzas samtempe ĝojon k malĝojon.

Ne scii la laboron raciigi, la kompleta senpovo de la industriaj laboristoj sendataj en la kolĥozojn, ne sukcesantaj enkonduki ion, kio similas reguligon, fortoŝparon, ne povantaj praktike utiligi sian sperton en la fabriko akiritan: jen estas la fundamenta malvirto de la laborprogreso ĉe la kolĥoz-loĝantoj.

La plejmulto el tiuj homoj vivas por interesoj de egoisma konsumado. Iliaj aspiroj havas solan bazon: donu al mi, unue, tion, "kio estas al mi ŝuldata", k ili forkondukas kun si, malgraŭ ĉiu kontraŭstaro, sian parton en siajn garbejojn. La akiremo subigas k diserigas pli ankoraŭ la komunanaron, kiu estis kreata.

Sekve de la manko de labormetodo, la nombro de l' jungilaro (ĉevaloj, traktoroj) estas malgrandega. Tial, la interligo en la laboro ofte rompiĝas. La ĉevaloj estas lacegigataj; pli ol la triono de l' traktoroj ne funkcias (detruataj elektrokandeloj, neniaj anstataŭaj pecoj). La en la kamparo rikoltita greno estas malorde lokata k ne gardata. La brulego de stoplokampoj estas kutima okazo. La draŝo malrapide progresas; la grenprovizumo testude iras. Oni havas impreson, ke, sekve de la escepta rikolto en tiu ĉi jaro (1930), la terkulturistoj ne finlaboros super la grenamaso; ŝajnas, ke tiu ĉi premegos ilin k ĝi putriĝos sur la kampoj.

Jen, favoraĵo, kiu falas sur nian kapon, ironias ili malkontente; de kie povas tio veni? Kion ni faros pri tiu lavango?

Ili ne scias kion fari kun tiu grandega riĉaĵo, k ekkonfuziĝas pri ĝi. Se ekzistus severa k inteligenta interdivido de l' taskoj, se ekzistus bona interligo en la laboro, tiu tuta grenamaso estus engarbejigata k liverata al la ŝtato dum la templimoj de la plano antaŭkalkulitaj. Tial, estas tre kompreneble, ke oni timas, ĉu la aŭtunaj plugadoj k semado ne estu fuŝataj.

Konsekvence, la avangard-brigadoj estas tro malmultaj; en kelkaj kolĥozoj ili tute ne ekzistas. Ne malofte oni akceptas malamike la organizantojn de tiuj brigadoj. La socialista konkura fervoro estas malofta okazaĵo. Oni konstatas ĝin nur inter la loĝantoj de la plej disciplinitaj kolĥozoj.

Se oni konsideras la kvoton da greno, post la draŝo rikoltata, proporcie al la greno uzata por la semo, k se oni komparas la kolĥozojn kun la privata ekonomio, estus tiu lasta, kiu superas.

Eĉ, se estas en la laboro la faktoro: maso, ĝi efikas kvante k ne kvalifike; efiko de malenergio, bridanta ĝis la plej malviglaj ritmoj. Oni ne faras mas-aktivecon kun tiuj amasoj; la *komsodoj* (komitatoj por helpo al la kolĥozoj), en la plej multaj *stanicoj* estas neaktivaj; la kvartal-kunvenoj ne okazas. Plej ofte la planoj estas pritraktataj inter la muroj de la vilaĝa soveto aŭ de la ĉelo. Sekve de l' malforta grado de disciplino ĉe la partianoj tiuj planoj ne estas konigataj al la kvartal-loĝantoj. Ne estas kultura, politika, eduka aktiveco; tamen la viroj de la kolĥozoj sopiras multon scii, ili volus esti plene informataj pri la politika k ekonomia vivo de la lando. Ofte la partianoj mem malfidindigas la novajn oficistojn, kreante ĉirkaŭ ili atmosferon, en kiu estas penige labori.

— Vi, vi venas por ricevi salajron, oni diras al ili, dum la popolo aprobas. Vi bezonas nur labori tiel, kiel vi volas. Koncerne nin, ni ne volas penegadi senpage, ni volas ankaŭ ion gajni.

(Daŭrigota.)

Trad. de la Alĝera Esperantista Grupo.

Ĉu "S-ulo" povas plenumi sian taskaron kulturan-klerigan

vere kontentige, se ĝi daŭre devas aperi nur en la nuna amplekso? Gek-doj! Por pli potence voki, admoni, konstruadi, por krei fortan bazon, solidan fundon, k plenumi ĉiujn taskojn antaŭ ni starigitajn, "S-ULO" DEVAS ESTI 12-PAĜA!

Ankaŭ ci, K-do, certigu ĝian progreson per konstanta varbado de novaj abonantoj!

LA KLASBATALO TRA LA MONDO

Batalo de senlaboruloj en Aŭstralio

En la urbo Darvin, en Norda Aŭstralio, la senlaboruloj hisis la ruĝan flagon sur la registaraj konstruoj, kies oficejojn ili okupis. Ili deklaris, ke ili tenus okupita la registarejon tiom longe, ĝis oni havigus al ili laboron.

Larmgaso kontraŭ senlaboruloj (Usono)

En la centro de la urbo Oklahama pli ol 700 senlaboruloj atendis je 20. januaro la rezulton de atako farita de aliaj 300 senlaboruloj al spicejo, kiu estis elrabata. Ĉiuj deziris ricevi iom da nutraĵo. Forta polica taĉmento estis alvokata, kiu aplikis larmgasajn bombojn por dispeli la amason. 60 laboristoj estis arestataj k gardataj en la malliberejo de multnombraj policistoj k fajrobrigadistoj, kiuj mal-

helpis, ke la amaso liberigu ilin. En la ŝtato Arkansas la mizero estas precipe akra pro la kotona misrikolto de l' pasinta jaro. La vivteno de l' duono de la tiea loĝantaro dependas de la koton-kulturo. *Laŭ D. T.(Per 3398)*

La balotoj en Hispanio prepariĝas sub la teroro

En Barcelono estas arestitaj dum kunveno en la sidejo de l' Respublikana Centro 23 delegitoj de ruĝaj sindikatoj; ili estas akuzataj antaŭ tribunalo esti farintaj decidojn interkonsente kun la malpermesitaj sindikataj organizoj.

Pro la kreskanta agitado de l' studentoj kontraŭ la monarkio la registaro fermis denove la Madridan universitaton. Studentaj manifestacioj estis dispelataj de la polico. La registaro agas tiom rigore kontraŭ la studentaro, ĉar la profesoroj deklaris sin solidaraj kun la ribelantaj studentoj. *P. M.*

Sukcesa striko de svisaj fervojistoj

La Svisa Federacio de Fervojistoj kondukis en decembro 1930 sukcesan strikon. La personaro de l' restoraci-vagonoj ĉesigis la laboron je 19. decembro por akiri kontrakt-reguligon de l' laborkondiĉoj. Depost la unua tago la trafiko de l' restoraci-vagonoj estis komplete interrompita. La kvinan tagon jam, post kiam la organizo estis elpaginta en la antaŭa tago la pagotan salajron, la kompanio komencis kapitulaci. Traktadoj okazis; sed nur je la oka striktago akordo estis atingita k la 27-an de decembro la kolektiv-kontrakto subskribita.

Laŭ "ITF-Bulteno" (jan.).

La sorto de l' politikaj malliberuloj en Polio

La laborista gazetaro okcidenteŭropa, k parte ankaŭ burĝaj gazetoj liberalaj, raportas detalojn pri la teror-reĝimo en Polio k speciale pri la terura sorto, kiun suferas la politikaj malliberuloj en la karceroj de Pilsudski. Ĉiu opinio malplaĉa al la faŝistaj regantoj estas persekutata; la laboristaj organizoj estas minacataj de ruiniĝo. La milicanoj de Pilsudski neniel malsuperas la nigraĉemizulojn de Musolini en la arto elrabadi k detrui sindikatajn k kooperativajn domojn. Ĉiu laboristo, kiu estas suspektata ne admiri la marŝalon, estas "konvertata" per kolbobatoj. Eĉ en la plej nigraj tagoj de l' carista reakcio la poloj ne suferis tiajn persekutojn kiel en la hodiaŭa "sendependa" lando.

Laŭ diversaj fontoj.

KIU INVENTIS LA KINEMATOGRAFON?

Je la 12-a de decembro 1930 la urbestro kune kun la urbkonsilantaro k aliaj eminentuloj de Lidz (Leeds) malkovris bronzan signon, enmetitan en la muro de iu Lidza konstruo, por la memoro de Ludoviko Amato Aŭgusteno Leprens *(Louis Aimé Augustin Le Prince)*, kiu sur tiu loko iam luis laborejon, en ĝi eksperimentis k fine inventis la kinematografon.

Leprens naskiĝis en Metz je la 28-a de aŭgusto 1842. Li edukiĝis ĉe la Kolegioj Burĵ *(Bourges)* k Sen Lui *(St. Louis)* en Parizo, k poste studis ĥemion k fizikon ĉe la Lajpciga Universitato.



Li venis al Lidz en 1866, sed reiris Francion je la komenco de l' francprusa milito. Poste li estis sieĝata en Parizo. Revenante Lidzon post la militfino, li starigis artkolegion, en kiu li precipe specialiĝis pri kolorfotografaĵoj.

En 1870 Edvardo Muibriĝ *(Muybridge)* sukcesis fotografi la movojn de konkurs-ĉevaloj, sed li faris tion uzante dudek fotografilojn. Tiu sukceso instigis Leprens eksperimenti, ĝis en novembro 1886 li ricevis usonan patenton n-o 376 247 por "metodo k aparato por produktado de moviĝantaj fotobildoj". En januaro 1888 li ricevis la patenton britan, k poste aŭstran, belgan, francan k italan. La aparato estis la unua, kiu per unu lenso povis fotografi moviĝantajn objektojn; komence ĝi prenis 12 fotetojn ĉiusekunde, sed poste ĝis 20.

Samtempe li inventis elektran projekciilon, k per ties helpo la unuaj filmbildoj vidiĝis projekciitaj sur ekranon. En aŭgusto 1890 li veturis Parizon por prizorgi aferojn rilatajn la inventon k lastfoje estis vidata je 16-a de septembro, kiam li envagoniĝis por viziti fraton en Diĵono. Depost tiam oni neniam plu vidis lin, k lia malapero restas tuta mistero.

L. B., Leeds.

Pri la konfeso de Mikaelo Bakunin

(el la Petropaŭla fortikaĵo al caro Nikolao la I.)

A. S. (10 580)

Post fiasko de la germana respublikana movado en 1848 estis kaptata Bakunin de la prusa ekzekut-soldataro. Li estis submetata al detalaj esploroj. La saksa juĝistaro kondamnis lin kiel kulpan pro perfido al regno je mortpuno. Sed la tiama venka aŭstra registaro de Francisko Jozefo postulis lian elliveron pro la intima rilataro kun la ĉeĥaj revoluciuloj k lia aktiva partopreno al la bataloj en Prago dum 1848. Bakunin estis fitransportata al Olmic, denove esplorata, denove kondamnata — ree je mortpuno. Kaj Bakunin eble estus perdinta sian 36-jaran vivon sur la remparoj de la fortikaĵo, se ne Nikolao la I estus anticipinta rajton pri la aventurulo k konspirulo, pri kiu oni delonge sciis, ke li depost 1840 iel partoprenis ĉiun renverseman movadon en Eŭropo.

Kaj ĉu la aŭstra registaro, kiu, kiel konate, helpe de rusaj soldataroj profitis la kronon hungaran, povis ne transporti la iaman artileri-oficiron de la caro (Bakunin) al la rusa fronto k lin enmanigi al ĝendarmoj de la ĉiopova?

Du monatojn Bakunin jam pasigis en la Petropaŭla fortikaĵo, kiam lin vizitis grafo Orlov, kiu en la nomo de l' caro jenon sciigis: "La caro irigis min al vi kun jena komisio: Diru al li, ke li skribu al mi kvazaŭ klerikala filo al sia klerikala patro — ĉu vi do volas skribi?"

Post ioma tempo por pripensado Bakunin efektive konsentis k verkis Konfeson "proksimume en formo de poeziaĵo k laŭveraĵo". Li, kiu neniel estis indulgita de samsortanoj, skribis jenon al la caro: "Cara moŝto, vi deziras, ke mi al vi surpaperigu mian Konfeson; bone, mi ĝin skribos, sed vi ja scias, ke ĉe konfeso neniu devas pentofari pro alies pekoj. Post mia fiasko restis nur unu trezoro al mi, la honoro k la konscio, ke mi perfidis neniun, kiu al mi fidis, k tial mi volas citi neniun laŭnome."

Estas nekompreneble, ke iuj konsideris ĉi tiun dokumenton (la Konfeson) fatala, kiu "kvazaŭ minaca ombro postsekvis lin (Bak.) ĝis morto. "Plurfoje oni volis rilatigi tiun ĉi dokumenton (aŭ la minacon de ĝia publikigo) kun ŝajna hezitemo aŭ retiriĝemo de Bakunin. En 1863 dum la pola ribelo restadis Bakunin en Svedio klopodante ekflamigi la polan movadon. Jen *oni* pretigis broŝuron enhavonta la Konfeson, petskribojn k aliajn dokumentojn, kiuj "senmaskigu" Bakunin. "Ne longe poste — k Bakunin forlasis rapideme Svedion k interrompis la rilatojn kun la poloj."

Pasis sep jaroj — meze de l' german-franca milito okazis du malsukcesaj ribeloj en Marsejo k Liono, en kiuj partoprenis Bakunin. Jen ree *oni* konsideras preson por "morale ruinigi" Bakunin, kiu "timeme k tuje sin retiris". Du jarojn poste — dum

Vi ne pripensis, ke por la posteuloj signifus konsolon, povi pluenlabori samcele kiel vi mem. Sola individuo estingiĝas, sed la komuna idealo neniam mortos. *F. S., Vieno.*

MATENE

Kia ĝojo estas en vekiĝo!
Kia ĝojo estas por la kor'
Senti, ke radion de tagiĝo
Ĝi renkontas klare, sen dolor'!

Dolĉa horo! Premas min nenio ...
Kie estas mia malgajec'?
Mi satdormis k al la radio
Nun ridetas, plena je viglec'.

Al agado! Kia ĝojo estas
En esper', kaŝata de la kor',
En espero, ke antaŭe restas
Multe da vekiĝoj sen dolor'!

D. Ŝutov.

LINGVAJ NOTOJ

Antaŭ nelonge mi legis en *Sennaciulo*, ke iuj surpriziĝis, ĉar laboristoj lernante per la Ĉe-metodo spertas nenian malfacilon pro la vortoj korelativaj de nia lingvo. Nu, kiam niaj geinfanoj konfuzadis tiujn korelativojn unu kun la alia, mi uzis jenajn naŭ frazojn, per kiuj komencantoj havas eblon nepre distingi la vorton deziratan:

1. Tempo informas ageman menson.
2. Maniero instruita evitas laboron.
3. Kvanto infinitezima ofendas mezuriston.
4. Individuoj indulgas uzuriston.
5. La loko inspiras entuziasmon.
6. La kvalito invitas akcepton.
7. Motivo inda almenaŭ laŭdiĝas.
8. Posedo infektas eĉ saĝulon.
9. Nedifinita pronomo indikas objektojn.

Klarigo: La komencliteroj kunigitaj faras la radikon de ĉiu korelativo; t. e.,

Tempo informas ageman menson

Tempo i . . . . . a . . . . m . . .

Kompreneble la lernanto devas rediri la frazojn parkere k respondi taŭgajn demandojn. Ekz.: Kio informas ageman menson? Kio evitas laboron? ktp.

Post dekjara uzado mi povas garantii la anglajn frazojn same aranĝitajn por helpi la memorkapablon, sed mi nur prezentas la esperantajn por helpi alilingvajn instruantojn k komencantojn. Ni ankaŭ uzas similajn frazojn por instrui ĉiujn afiksojn, sed ŝajne estus pli bone, ke ĉiu instruisto faru siajn proprajn el vortoj aŭ esprimoj tre uzataj en lia urbo. *E. A. Young, Panama kanalzono.*

K-do 13 205 demandas: "Ĉu 'kun' aŭ 'pri' estas ĝusta en jena esprimo: Kiel estos pri la abio? Kiel estos kun la abio? en la senco: Kio okazos kun (pri) la abio?" *Respondo:* Ambaŭ formoj estas korektaj; eĉ pli ofte oni trovas 'kun' en tiuj frazoj ol 'pri' (kvankam 'pri' ŝajnas esti la pli logika formo).

Al K-do 10 677: "Sian" estas tute ĝusta en la frazo "Tre ofte patro mortigis sin k *sian* tutan familion" (ĉar temas pri la familio, kies ĉefo estas la patro, la gramatika subjekto en tiu ĉi frazo). Komparu pri tio la ekzemplojn sur paĝo 430 de l' "Plena Vortaro". *L. L.*

LA IZOLITOJ

(Laŭ Bobinska: *Pioniroj*)

Resumo de l' antaŭaj ĉapitroj: Tri geknaboj (Vanka, Katka, Juk) estas senditaj el junpionira tendaro por serĉi knabinon, kiu forkuris en barko. Ili trovis ŝin sur insulo en mezo de granda lago, kien transportis ilin vaporŝipo, k celas ŝin rekonduki al la tendaro sekvantan matenon. Sed dum la nokto la kaptito ree forkuras per la sama barko, k la tri infanoj restas izolitaj sur la insulo, sen transportilo. Ili decidas doni fajrosignalojn al la tendaro k konstruas tiucele du lignoŝtiparojn.

Ŝi estas ĝoja[1] vidante la grandiĝantajn lignoŝtiparojn. Ne estas sufiĉe, laŭ ŝia opinio.

Ŝi volus, ke la ŝtiparoj estu tiel altaj, tiel altaj kiel la abioj. Tiam, kiaj[2] flamoj! Vanka hakas per ĉiuj siaj fortoj kun persistego. Liaj nigraj haroj gluiĝas al la frunto; la ŝvito gutas de sur[3] lia vizaĝo, li neniel pensas pri ekhalto. De tempo al tempo Katka k Vanka reciproke ĵetas al si mallongan rigardeton[4], ili interkompreniĝas tre bone, ili ŝatas tiun ĉi laboron obstinegan k pasiigan.

Juk alkuris, li diris, ke barko estas videbla, sed tre malproksime.

— Ĝi estas meze de la lago k ne moviĝas, estas certe fiŝkaptistoj.

Ĉiuj tri kuras al la bordo fiksante en malproksimo la nigran punkton.

— Tro malproksime, konkludas Vanka, ili ne povas nin aŭdi nek nin vidi, eble ili alproksimiĝos poste.

Estas tempo anstataŭi[5] Juk, Katka havas gardodeĵoron. Juk tranĉas arbetaĵojn, Vanka vicigas ilin en amasojn.

— Mi kredas, ke estas tempo por tagmanĝi, diras Juk, formetante sian ĥakilon, k li indikas[6] per la mano la pozicion de l' suno: ĝi staras jam tre alte, super la suproj de l' pinoj.

La mizera stomako de Juk scias jam depost iomo[7], ke estas tempo por manĝi.

Vanka anoncas ripozon de du horoj[8]. Unu amaso estas finita, la alia duone. Oni povas ripozi en plena trankvilo[9].

Juk rigardas malgaje sian malgrandan porcion. Li rimarkigas laŭ bondiplomata maniero[10]: "Estas neeble, ke oni ne rimarku tiun ŝtiparon el la tendaro. Oni venos certe nin helpi[11] en ĉi tiu sama vespero." Kaj li ĵetas elokventan rigardon en la direkton al la sardinskatolo.

— Ili povus bone difektiĝi ĝis morgaŭ, li aldonas prudente.

Vanka trankviliĝas lin; li alligos la skatolon

al ŝnureto k subakvigos ĝin — tiel ili ne povos putri. La malfeliĉa Juk eluzis siajn argumentojn, sed kiom li malsatas!

— Ĉu ci scias, Juk, diris al li Katka, anstataŭ diskutaĉi, ni prefere ekiru kolekti fragojn.

Oni trovis fragojn abundkvante[12].

Oni plenigis per ili du pokaletojn. Kian bonan manĝon tio donis!

[1] Aŭ: ĝojas. [2] Ne: *kiuj*, ĉar ne temas pri iuj inter multaj, sed pri la kvalito, la speco de la flamoj. [3] Ankaŭ simple: *de* la vizaĝo ("sur" precizigas la pozicion de la gutoj). [4] Aŭ: ekrigardon. [5] Aŭ: deŝanĝi. [6] Aŭ: signas. [7] Aŭ: momento, ioma daŭro. [8] Aŭ: duhoran. [9] Ankaŭ: plentrankvile. [10] Aŭ simple: bondiplomate. [11] Aŭ: je nia helpo. [12] Aŭ: abunde, en abunda kvanto.

ANEKDOTOJ

La superruzulo

Homo, kiu opiniis sin tre saĝa, aĉetis keston da cigaroj. Li iris kun ĉi tiu kesto kun cigaroj al societo de asekuroj kontraŭ bruldomaĝo por asekuri ĝin. Tute trankvile li poste fumis la cigarojn k iris nun denove al la asekursocieto k postulis la pagon de la asekursumo. Oni rifuzis tion. Pro tio la ruzulo iris al la juĝejo k akuzis la asekur-societon. La juĝistaro kondamnis la societon laŭ paragrafoj pagi la sumon. Sed poste ĉi tiu societo akuzis antaŭ la sama juĝistaro la ruzan fuminton de la cigaroj pro forbruligo de asekuritaj objektoj. Kaj nun kondamnis la juĝistaro la superruzulon laŭ aliaj paragrafoj je la puno de trimonata malliberejo.

Trad. Alb. Burger (5861).

La ŝtonego

Kolosa ŝtonego kompakte, peze k trankvile kuŝis sur la ebenaĵo. Estis dezirinde — eĉ nepre necese — ruli ĝin antaŭen. Ĉeestis ankaŭ multe da agemuloj, kiuj streĉis ĉiujn siajn fortojn tiucele, sed ili gardis diversajn



opiniojn pri la direkto "antaŭen". Granda parto el ili penis ruli la ŝtonegon orienten, dum alia parto insistis ŝovi ĝin okcidenten. Krome kelkaj apartemuloj obstine premegis kontraŭ la suda, respektive la norda flanko de la ŝtonego. Sekve de tia neprudenta agmaniero nur iam k iam ili sukcesis ĝin movi iomete, jen al la suno, jen for de la suno, tute hazarde laŭ la fortoproporcioj senĉese ŝanĝiĝantaj.

Subite eksplodis vulkano ĝuste sub la ŝtonego! Tuj ĉi tiu estis forĵetita je nemalgranda distanco al oriento, refalis sur ebenaĵon k — denove ĝi kuŝis kompakte, peze k trankvile.

Tiuj el la agemuloj, kiuj postvivis la naturan katastrofon, kune kun grandnombro da novuloj baldaŭ sin restarigis ĉirkaŭ la ŝtonegon k ekkomencis la lacigan kontraŭludon denove.

La kolosa ŝtonego ankaŭ havis nomon. Ĝi estis enskulptita kvazaŭ zono, proksimume jene: L a g r a n d a a m a s o i n d i f e r e n t a d e l a p o p o l o.

W. Riedel (16 652).

Pastra ruzo

Pastro bezonas monon por malriĉa familio. Li havas grandan penadon por akiri la sumon. La aferoj ja funkcias malbone, k ĉe la adresoj, ĉe kies pordoj li regule, ne senrezulte alfrapis, li ne povas kuntamburi sufiĉon por helpi en la unuaj necesoj. Li eksentis ideon. La proksiman dimanĉon li predikos pri honesto k li finos per la vortoj: "Kun granda bedaŭro mi devas komuniki al vi, ke inter miaj ĉeestantoj sin trovas sinjoro, kiu ne estas tute honesta. Kiam celata sinjoro hodiaŭ deponas unu taleron (du k duonon da guldenoj) en la kolektujon, mi ne konigos lian nomon."

Tiel okazis. Post la diservo la diakonoj trovis en la kolektujo tridek talerojn k krom tio guldenon paper-envolvitan, sur kiu staris skribite: "Mi havas ĉe mi nur unu guldenon, la restaĵon mi sendos morgaŭ."

La pastro provizore atingis sian celon.

15 262 (T).

Trompita

— Ĉu vi ĉion konfesis? — pastro demandis al pekinto dum la konfesado.

— Ne, respondis ĉi tiu, — mi havas alian pekon ankoraŭ sur mia konscienco. Mi ŝtelis horloĝon. Ĉu vi volas akcepti ĝin?

— Mi? diris la pastro. — Kiel vi povas kuraĝi insulti min k mian sanktan profesion en tia maniero? Tuj redonu la horloĝon al la laŭleĝa posedanto.

— Mi jam proponis ĝin al li, k li rifuzis akcepti ĝin. Tial mi petegas vin preni ĝin.

— En tia okazo, diris la sensuspekta pastro, — mi povas doni pardonon al vi; sed vi devas sincere promesi ne ŝteli ion pli.

Baldaŭ post la foriro de la pentinto la pastro malkovris, ke oni ŝtelis lian propran horloĝon de l' hoko, sur kiun li kutime pendigis ĝin, k li tiam komprenis, ke la malpia ŝtelinto proponis ĝin al li, sed li rifuzis akcepti ĝin . . .

KIEL MI FARIĜIS ESPERANTISTO

Dum la jaro 1924 mi ofte banis min en la banejo de l' "Akva sportunuiĝo laborista", ĉar mi estas bona naĝanto. Ankaŭ iun dimanĉon mi estis tie. Subite mi vidis fremdajn naĝantojn en nia banejo (Burgŝtetanoj). Kelkaj disdonis propagandilojn, kiuj sciigis pri esper-

anto. Ankaŭ estis vortoj sur ĝi, kiujn mi ne komprenis. Mi faldis k enpoŝigis la flugfolion. Malfrue mi estis en dancejo en Kosen *(Cossen)*; tie mi vidis konatan K-don, kiu portis la verdan stelon. Demandinte pri la signifo de tiu insigno, li klarigis al mi la aferon. Tiam mi malfaldis mian paperon k serĉis. Mi trovis sur ĝi vortojn k frazojn kiel ekz. "Bonan tagon, vi simio." Mi iris al li k diris tion. Subite li komencis fari grandan bruon, sed mi petis lin silenti. Li tiam demandis, ĉu mi parolas esperanton. Mi respondis germane, ke mi ne komprenas, sed nur legis la frazon sur la propagandilo, kiun mi ricevis de Burgŝtetaj esperantistoj. Li informis min tuj pri esperanto k nia movado k donis al mi la adreson de kursejo. Mi priparolis la aferon kun mia amiko Leman k ni decidis veturi tien. Ni lernis esperanton k ekkonis baldaŭ ĝian utilon. Bedaŭrinde mia amiko forvojaĝis pro laborŝanĝo k mi nun restis sola. Kun helpo de l' Burgŝtetaj K-doj ni komencis fari kurson en Luncenaŭ *(Lunzenau)*, kiu estis vizitata de proksimume 60 personoj. Pro mia laborŝanĝo mi ne ofte restis hejme k tial ne ĉiam estis informita pri la stato de l' kurso. Fine, kiam mi demandis okaze amikon pri ĝi, li ridis k diris, ke la partoprenantoj estas 6 personoj.

Post nelonge tamen ni sukcesis fondi Laboristan esperantan grupon kun 5 membroj. Hodiaŭ mi preskaŭ perfekte parolas esperanton k ricevis pli ol 500 leterojn k poŝtkartojn el multaj landoj. Mia plezuro pro lerno de esperanto estas grandega. Mi alvokas ĉiujn K-dojn uzi k propagandi ĝin ĉiam k ĉie.

Fritz Kramer (8453).

POR NIA DISTRO

Solvoj el la antaŭa n-o:

Ju pli sincera la homo estas, des pli da malamikoj li havas. *(7960)*

Nomenigmoj

Trovu vort-partojn k kombinu ilin laŭ jena sube montrita maniero:

	Kaj vi ricevos jenon:
1. Vira nomo + rajd-apartenaĵo	legomon
2. Legomo + fortega besto	gloraman militiston
3. Komenca ½ de vira nomo + granda ujo por fluidaĵoj	ajon, per kiu sin stulte k konstante venenas multaj
4. Virina nomo + vorto similanta al "puro"	mov-pupon
5. ⅓ de unu nuntempa angla ministro + unua homo	ŝtonet-rubon
6. ⅓ de la sama ministro + parenco de konata profeto	migdal-paston

(10 996)

Ŝercenigmoj

25. Kiam astrojn oni renkontas en la libroj?
26. Kiam filozofo estas infano?
27. Kiam ŝipoj promenas sur la pavimoj?

(1116)

Humoro

Embarasa demando

—Se la instruisto punis cin, ne estas por sia plezuro...

—Vi tamen ne volas diri al mi, ke estas por mia!

La kontraŭveneno

—Mi aĉetis beletan tamburon al Toto por lia festo, k ci, kion ci aĉetos al li?

—Nu... tranĉilon!

Ne trankvilige



—Mia koro estas kiel torento tumulteca, kiu superbordiĝas!

—Ho ne! dankon!... Neniajn superakviĝojn ĉi tie!...

*

—Vi estis promesinta al mi, ke Rozinjo resaniĝus sekvante vian kuracmetodon, sinjoro doktoro, sed ŝi mortis.

—Dum kiom da tempo ŝi sekvis ĝin?

—Dum dek kvar tagoj!

—Tio ne mirigas min! Oni neniam aŭskultas min pli ol duone! Mi estis ordoninta al ŝi sekvi ĝin dum tuta monato!

Necesa

Mario: "Kion vi legas momente, Paŭlo?"

Paŭlo: "Fulmotondro, maljunulino, fermu la buŝegon k ne ĝenu min! Vi do vidas, ke mi studas la lernolibron: 'La bona konduto'."

M. S.

La plej granda ovo

"Panjo, kies ovo estas pli granda, anserina aŭ kokina?"

"Kompreneble la anserina, ĉar anserino estas pli granda ol kokino."

"Nu, tiam kuiru al mi bovinan ovon."

F. N.

Ĉiu K-do nepre legu k havu en sia biblioteko

La Laborista Esperantismo

la tiom kritikatan — laŭde k mallaŭde — verketon de E. Lanti. SAT-eldono.

40 pĝ. Form. 11×17. Prezo: 0,40 mk. g.

Administracio de SAT Leipzig O 27.

(Eldonkvanto 10 000 ekz.)
6-a JARO. N-o 2 MONATA ALDONO AL SENNACIULO 12. II. 1931

La Lernanto

REDAKTEJO: 14, av. de Corbéra, Paris XII-e ★ ADMINISTREJO: Kolmstrato 1, Leipzig O 27

LABORKUNULO MORTIS

Tute subite ni eksciis en la oficejo, ke nia kolego K. ĵus estis mortinta. Neatendite, kiel fulmo el blua ĉielo nin trafis tiu sciigo k ni staris kvazaŭ ŝtoniĝintaj. Ĉu fakte li ne plu vivas, kiu nur antaŭ tri tagoj estadis inter ni, laboris k parolis kun ni? Jes, li jam suferis kormalsanon k de tempo al tempo dum kelkaj tagoj devis ripozi k refreŝiĝi; do ni ankaŭ nunfoje opiniis, ke li venontan lundon estus revenonta k neniu supozis tiun rapidegan morton.



Infandesegno

Se oni permorte perdas parencojn, oni ofte jam depost jaroj ne renkontis ilin aŭ eĉ ne ekzistis spiritaj interrilatoj kun ili. Sed kun la kolego ni komune pasigis ok horojn potage en la sama ejo k egale dividis la oficajn ĝojojn k afliktojn. Ni ankoraŭ vidas lin antaŭ ni sidanta ĉe la skribotablo, ni aŭdas liajn ŝercvortojn, kiujn li kutime uzis, k sentas lian esencon meze inter ni. Kaj nun imagi, ke li estonte tute forestos, ke lia konata vizaĝo neniam plu aperos en la enirpordo, ke ni atingos la unuan sabaton sen li k ĉesigos la semajnan laboron sen liaj spritaj eldiroj, el kiuj ĉiam aŭdebliĝis la ĝojo pri la libera dimanĉo — ĉu eblas tio?

Ankaŭ tiuj kolegoj, kiuj kelkfoje disputis kun li, nun funebris k eble pentis pro akraj interparoloj; la morto superis k forgesigis la opiniajn diferencojn. Ni memoras pri la planoj k intencoj de la mortinto. Unu rakontas, ke li volis aĉeti novan vestaĵon k nun li ne plu bezonas ĝin! Al mi li promesis, dum la printempa arboflorado kun mi suriri la monteton urboproksiman "Bisamberg", ĉar li ja forte amis la naturon. Tio nun ne okazos. Kaj ni interkonsentis, foje viziti kinejon; kiel bedaŭros la neplenumeblon de tio mia edzino, kiu konatiĝis kun li dum prezentado de la sonfilmo "Blankaj ombroj". Hejme mi pruntehavas libron de li, unu el la sentoplenaj skizoj de Laŭrids Brun *(La feliĉa insulo de Van Canten)*, kiun verkiston li precipe ŝatis. Ĉio ĉi de li ankoraŭ *vivas*, kvankam la sorto kruele forŝiris lin de ni k lia trostreĉita koro por ĉiam ĉesis bati. Sed plej terure estas, ke la ekstera vivo ne rimarkas lian mankon k funkcias regule, laŭkutime. Ke trankvile la horloĝo tiktakas k la pendolo oscilas, ke la strata trafiko muĝas kiel antaŭe, tio efikas furioziĝe. Nun la suno hele brilegas sur burĝonintajn arbustaĵojn. Post semajndaŭra pluvetado hodiaŭ venis la unua bela tago . . .

Kara kunulo! Kiel domaĝe, ke vi ne estis kunligita kun iu socia ideo aŭ movado. Vi ja malamis la militon k eĉ malbone traktis vian malsanan koron por eviti, devi militservi; eble vi tiel iĝis malfrua milita viktimo. Vi ankaŭ simpatiis kun la socialismo, sed ne aktive partoprenis konkeri ĝin.

NECESO DE LABORISTA SENNACIISMO

El la franca gazeto "Mondo" (Monde) ni tradukas jenon (temas pri la nuna ekonomia krizo): "... Sed nune, ni ankoraŭ plene estas en kapitalisma reĝimo. En tiaj kondiĉoj, kiel la laborista kontraŭstaro al mastrara atako estas ebla? kaj ĝenerale, ĉu ĝi estas ebla?

"Ni kredas, ke ĝi estas neebla en la kadro de tiu aŭ aliu lando. En la nuna situacio ĉiu nacia kapitalistaro povas pligrandigi sian merkaton nur batalprenante parton el la merkato de la kontraŭaj kapitalistaroj. Tion ĝi povas fari nur vendante malpli kare ol ili. Por tio ĝi devas, ĉu samtempe ĉu aparte, uzi tri solvojn: a) malpliigi la fabrikad-koston de la varoj (senpera atako kontraŭ la salajroj); b) raciigi la fabrikad-rimedojn (pli granda senlaboreco k sekve konsekvenca premo sur la salajrojn); c) praktiki la dumpingon subtenitan de monopoloj k super-dogantarifoj (ekspluatado al la aĉetantoj, salajruloj k. a.).

La laborista movado en ĉiu lando troviĝas antaŭ kruela dilemo: se ĝi rezistas pli ol tiu de la konkurencaj landoj, ĝi malhelpas sian mastraron efike konkurenci la aliajn k riskas pligrandigi la senlaborecon kompense je la elteno de la samaj salajroj; se ĝi volas eviti kreskadon de senlaboreco, ĝi devas, por ke ĝia mastraro povu konkurenci la aliajn, konsenti oferojn. Ambaŭokaze ĝi trafas malpli altan vivnivelon k laborkondiĉojn pli malbonajn. La firmigo de la salajroj kune kun pli granda senlaboreco, la pli granda nombro da senlaboruloj premos sur tiujn, kiuj laboros senpere (en la familio) aŭ pere (senlaborula helpkaso de l' sindikatoj, de l' ŝtato ktp.).

"La bildo estas pesimista. Ĉu ne estas alia elirejo? *Ne en la kadro nacia.*

"Sed pli efika kontraŭstaro estas ebla sur internacia skalo. Se ĝi estus organizata samtempe k interkonsente de la plej gravaj sindikataj konfederacioj, tiu kontraŭstaro metus la diversajn naciajn kapitalistarojn en samajn kondiĉojn unuj kontraŭ la aliaj. Neniu el ĉi tiuj povus argumenti pri la salajra malaltigo ĉe la najbaro por trudi la saman malaltigon al siaj laboristoj. Responde al internacia karteligo de l' kapitalo oni devos starigi la internacian agadon solidaran de la laboruloj."

Kelkaj vortoj estas necesaj por eltiri el tiu teksto iujn konkludojn. Ĉu vi ne rimarkas, kara K-do leganto, ke ĉiam, kiam temas pri la intereso de l' laboristoj, oni vole-nevole estas puŝata sur internacian aŭ tutmondan kampon? Estas kvazaŭ gvidvorto: internaciaj rimedoj... internacia solidaro... internacia kunagado... ktp. Tial stariĝas la demando: ĉar ĉiam la laborista agado kontraŭ kapitalismo, ĉu ĝi estu atakema aŭ defenda, devas transsalti la landlimojn, por kio utilas al laboristaro ĉi lastaj?

Transsalti estas ja pli malfacile ol transpaŝi sur ebena kampo! Kial do la laboristoj defendus la barilojn k nur provus ilin malaltigi? kial tie, kie ili ne ekzistas, la proletoj batalus k sinoferus por ilin starigi? Estu for do ĉiu agado celanta defendi la naciajn apartiĝojn, kie ili ekzistas; ni rifuzu batali por krei novajn. Kontraŭproleta estas tiu agado.

Oni ne argumentu, ke ĝi malfortigas kapitalismon: ĝenerale tiu batalo por krei novan nacion profitas al iu kapitalistaro nacia kontraŭ alia. Kaj plie eĉ se ĝi, momente, sukcesus malutili al iu kapitalistaro, estonte ĝi malutilegus al realigo de socialismo. Por oportunaj nunaj celoj ni ne starigu sur nia vojo, jam tre malebena, novajn malfacilaĵojn.

Cetere, la solvo proponita de la redaktoro de "Mondo", kiu estas pure

Por eviti la rifon!

K-doj! Pro reteno de nia mono en Moskvo SAT ŝuldas ankoraŭ nun al diversaj kreditoroj 50 000 francajn frankojn.

Ĉu tio signifas bankroton? Ne, certe ne! Ni ja posedas librostokon je valoro de 100 000 frankoj k sufiĉus, ke la K-doj provizu sin per bona literaturo eldonita de SAT, por ke baldaŭ ni povu pagi la ŝuldojn.

Ne prokrastu mendi la SAT-librojn! Agitu tiucele en la grupoj. Ne nur vi ebligos tiel al SAT eviti la rifon, sed vi helpos al vi mem perfektigi vian esperantan scion, instruadi vin k tiel plikleriĝadi, akirante tiujn ecojn, kiujn bezonas konscia proleto.

Atentu vi ĉiuj nian ardan alvokon! Petu prospekton ĉe la Administrejo de SAT!

---

la italaj movadoj — ree aperis la fantomo, je tria k lasta fojo.

Kial *oni* ne publikigis la Konfeson? (La dokumento troviĝis en la sekretfako de l' ĉefo por la 3-a sekcio kancelaria de l' iama caro en Leningrad, ĝi publikiĝis nur post la revolucio (en 1917). Ĉu ne estus facile al Bakunin aŭ liaj amikoj kontraŭagi dokumenton verkitan sole kiel *rimedo* por rehavigi la liberon por "denove tie komenci, kie mi devis ĉesi, tial ke oni min ĉi tien kondukis, nur per plia persisto, eble per plia singardo" — kiel li el malliberejo per kaŝa skribaĵo sciigis.

Tiu konfesdokumento — makiavela majstraĵo — estas la plej kompleta el la verkoj de Bakunin. Ĝi estas aŭtobiografio, sed fakte ja miksaĵo el poezio k vero. Tamen, traleginte tiun emocian skribaĵon, — kiu ne resentus la maltrankvilon, la persiston, agemon, oferemon, ja emegon, kiuj instigis tiun revoluciulon suriri barikadojn, eksciti amasmovadojn, per ĉiu fibro akceli renverson, starigi novan socion por la bono de l' laborularo?

La vivo de Bakunin estis fiasko. Ĉu? Li neniel venkis, lin frakasis la cirkonstancaro. Sed ĉu tiu arda ageg-ulo (Herzen diris pri li: Mikaelo havas en si satanon; en la februar-revolucio en Francio diris *Kosidier* (Caussidière): 'Kia homo, kia homo! En la unua tago de l' revolucio li estas bonega, sed morgaŭon oni devus lin pafmortigi) ne havis ion por diri al la submatаro? Lia celado: la liberigo al la slavoj, la detruo al Aŭstrio-Hungario trafis relativan realiĝon en 1918. Kvazaŭ profetaĵo realiĝinta ŝajnas lia priskribo pri irenda vojo por la rusa revolucio.

La tutslava problemo, pri kiu sin multe okupis Bakunin, irigis lin en 1848 al Prago, kie okazis la Slava Kongreso, kies ento estu unua provo je unuigo k interakordigo de l' slavoj. Ĝia rezulto estis negativa.

"La Kongreso dismembriĝis en tri sekciojn: la norda kun la poloj, malgrandrusoj k silezianoj; la okcidenta kun la ĉeĥoj, moravianoj k slovakoj; k la suda, en kiu estis la serboj, kroatoj, slovenoj k dalmatianoj. Laŭ la origina plano de Palacki, la fakta inspiranto k gvidanto de l' "slava kongreso", la Kongreso konsistiĝu nur el aŭstriaj slavoj, la ceteraj estu nur allasitaj kiel gastoj. Se tiu limigo estis malaprobata tuj ĉe komenco de la Kongreso. La kunsidojn partoprenis ne kiel gastoj, sed kiel efektivaj membroj, multaj poloj el Poznanio, krome polaj elmigrintoj, kelkaj turkaj serboj k fine du rusoj: mi k ankaŭ ortodoks-kreda popo, kies nomon mi forgesis —."

(Daŭrigota.)

ATENTU!

En ĉi tiu n-o troviĝas la

ALIĜILO

al 11-a Kongreso de SAT!

sennacieca, renkontas aliajn malhelpojn: inter ili ni citu la disdividon, en multaj landoj, de la sindikata lab. movado je pluraj organizoj plej ofte malamikaj inter si. Nenia efika agado estos ebla, ĝis la plej granda parto de la laboristaro tutmonda estos organizita en unu sola organizo. Ne gravas, ĉu apud tiu granda konfederacio sindikata staras kelkaj malgrandaj: kompleta unueco neniam ekzistos, sed relativa unueco estas ebla. Ĝi devas esti realigata en ĉiuj landoj. Tiu temo en Francio estas sufiĉe diskutata nun en laboristaj rondoj. *K. Ru. (835).*

Ankoraŭfoje "Kial senlaboreco?"

Pri supra demando aperis en n-o 328 de "S-ulo" artikolo, en kiu mi post klarigo pri maltaŭgaj bataliloj kontraŭ la senlaboreco klarigis per tre mallongaj frazoj mian opinion pri tiu laŭ mia konvinko sola armilo kontraŭ la nuna mizerega krizo ekonomia. La klarigo de mia ideo estis tre konciza, tamen ĉiu pensemulo povas sufiĉe elĉerpi el ĝi k povas fari siajn pluajn konsiderojn pri ĉiuj tiaj rilatoj. Sub mia artikolo troviĝis noto de l' redakcio, kiu enhavas duban opinion pri tiu mia ideo. Verkinte la artikolon mi estis certa, ke multaj SAT-anoj ne konsentas al ĉiuj miaj diroj, pro tio mi opiniis necesa malfermi diskutadon pri tiu afero, kiu estu por ĉiu (precipe nuntempe) nepre interesa. Kvazaŭ urĝas, ke ni akiru klaran bildon pri la ekonomiaj malsanoj k sanigrimedoj. Mi supozis, ke la redakcio nepre atentigus pri komenco de l' diskuto tiuafera k ne nur aldonus tiun solan "dubo"-noton, kiu tute ne enhavas iun refutan sencon, sed nur kontraŭas mian ideon per unu vorto. Ni estu kritikemaj, sed nur tia kritiko valoras, kiu anstataŭas la kritikitan per pli bona opinio. Tial, Gek-doj, ĉar la redakcio ne alvokis, mi alvoku al vi: partoprenu en la diskuto pri tiu vere aktuala temo. *SAT-ano 6707.*

MI VOLAS SCII...

1. Kial Sovetio fordonas mendojn al Francio k Italio pli ol al Germanio, kvankam en Germanio pli da kom.-partianoj ekzistas ol ie ajn?

2. Ĉu vere ankaŭ ĉiuj veraj gvidantoj scias k *komprenas* la moton: Proletoj de la mondo unuiĝu!?

3. Ĉu ankaŭ la proverbo konvenas, kiun oni aldonis mian vivovojon, por gvidantoj? "En la mondon alkutimiĝu, ĉar via kapo estas tro malgranda, por ke la mondo iru en ĝin."

O. B. (16 365).

TRA ESPERANTIO

Opinio pri la opozicio

Mi ne estas komunisto, sed simpatianto al kompartio k Sovetio, kiujn mi ĉiam laŭpove subtenis k defendis. Mi tamen ne povas aprobi la starpunkton de la opozicio k precipe ne ties agojn. Riskante, ke la opoziciuloj ankaŭ min nomos revizianto, oportunisto k Lantiano, mi volas malgraŭ tio diri mian opinion.

Ĉiu, kiu iom kritike legis la publikigojn de la opozicio, ne povas ne rimarki, ke estas en ili malmultaj bone fundamentitaj argumentoj. Sed abundas asertoj senbazaj, diraĵoj neveraj, konkludoj eraraj. En "S-ulo" n-o 326 oni trovas etan kolekton da tiaj opoziciaj asertoj kun respondoj de la Direkcio, kiuj donas trafan, sed malĝojigan bildon pri la opozicia taktiko. En diversaj artikoloj de la opozicio troviĝas multaj aliaj similaj argumentoj (?), kiujn ĉiu sen peno povas refuti.

La fakto, ke la opozicio devas agi tiel, atestas pri ĝia interna malforto. Per patosaj vortoj k aplombaj asertoj ĝi klopodas impresi la SAT-anaron k kaŝi la malriĉon de sia argumentaro.

Mi konstatas, ke eĉ tiuj argumentoj de la opozicio, kiuj estas iomete principaj, estas facile refuteblaj, ĉar ili estas bazitaj sur eraraj premisoj. Eble iuj K-doj opinias, ke tiuj argumentoj pravigas la opozicion. Mi klopodos montri per kelkaj vortoj la malĝuston de tiu opinio.

Unu tia argumento estas, ke SAT forlasis la klasbatalan vojon k ke ĝi (la opozicio) volas rekonduki SAT sur tiun vojon.

Sendube SAT estis dekomence klasbatala organizo. Sed la grado de klasbataleco ne estas difinita k ne estas difinebla. Pri klasbatalo ja ekzistas ĉe diversaj tendencoj malsamaj opinioj. Tio, kion socialdemokrato nomas klasbatalo, estas laŭ anarkisto k komunisto io tute alia k tio, kion anarkisto nomas klasbatala, estas laŭ komunista percepto reakcia k la klasbatalo de komunisto k anarkisto estas malaprobata de socialdemokrato. Estas klare, ke pri klasbatalo ne ekzistas komunakceptita difino. Do, se SAT estus klasbatala laŭ komunista (opozicia) vidpunkto, la aliaj tendencoj en SAT havus pri tio tute alian opinion k venus opozicio de alia flanko. Se ni volas, ke SAT estu organizo, en kiu estas loko por ĉiu klasbatala tendenco, ĝi devas resti sur la *meza* vojo k ne povas cedi al la postuloj de unu tendenco.

Alia argumento opozicia estas, ke K-do Lanti propagandas en SAT siajn sennaciismajn ideojn, kiuj iel kontraŭas la starpunkton de politikaj partioj. Mi persone ne tute aprobas la sennaciismajn ideojn de K-do Lanti. Mi tute malaprobus — same kiel la Direkcio mem! — ke SAT propagandu sennaciismon. Sed ĉu ni tial devas malpermesi, ke K-do diru sian opinion pri iu afero laŭ sennaciisma vidpunkto? Ĉu SAT-organoj ne plurfoje enhavas ideojn, kiujn iuj el ni ne tute aprobas? Ĉu SAT estas partio, en kies organo nur unu opinio, nome la partia, povas esti esprimata, aŭ ĉu ĝi estas larĝ-starpunkta, ĉiutendenca organizo?

Kaj krome, se la opozicio opinias, ke estas nedezirinde, ke en SAT-organoj aperu foje notoj pri sennaciismo, ĉu ne ekzistas demokrata vojo por akiri eldiron pri tio de la tuta SAT-anaro? Ĉu ne eblas prezenti proponon aŭ rezolucion pri tio al SAT-kongreso? Ĉu por tio necesas starigi konkurencan gazeton, konkurencan libroeldonejon k kalumnii tiujn, kiuj dum deko da jaroj sinofere laboris por nia organizo?

Kiel ajn oni rigardas la aferojn, la agado de la opozicio estas k restas danĝera, malinda k al SAT malutila entrepreno. Kio okazos, se la nuna Direkcio estus forigita k pli "klasbatala", pli "revoluciema" gvidantaro okupos ĝiajn postenojn? Oni nur bezonas legi la opozician organon por vidi, sur kiu vojo tiu gvidantaro promenos. La opozicio povas diri, ke ĝi ne volas komunistigi SAT; mi konstatas, ke eĉ se ĝi ne volus tion, la efektivigo de ĝiaj postuloj nur povas

Por relative tre modera sumo
vi povas akiri libron de daŭra valoro:

PLENA
VORTARO DE ESPERANTO

La unika lingva konsultilo por ĉiu esperantisto!

536 paĝoj. Form. 14×20 cm.
Prezo: bindita 10 mk. g., broŝ. 9 mk. (afrankite).

SAT *23, rue Boyer, Paris XX, aŭ Colmstr. 1, Leipzig O 27.*

rezultigi, ke SAT iĝos komunistema, unuflanka organizo. Mi opinias, ke tio utilus nek al SAT, nek al Komintern, nek al Sovetio. *G. P. de Bruin (670).*

KOMUNIKO DE LA PLENUM-KOMITATO DE SAT

La sekretario de la Kontrol-Komitato, K-do L. Berĵje, komunikis al ni la dokumentojn pri elekto de tria membro en la K.K., je la loko de l' eksiĝinta K-do Ĵanere (Jeanneret)[1]. *La kunveno de l' Brusela SAT-anaro okazinta la 22. jan. estis elektrajta laŭ la Regularo de l' K.K., ĉar ĝin partoprenis 18 aktivaj SAT-anoj el sume 27 troviĝantaj en Bruselo.*

Post aŭskulto de la deklaroj de K-doj Ĵanere, Berĵje k Van Aelst k post diskutado la SAT-anoj ĉeestantaj daŭre reesprimas sian fidon al K-doj Van Aelst k Berĵje k elektas K-don S t a e l e n s *(5895) kiel trian membron de l' K.K. El 18 ĉeestantaj K-doj voĉdonis 12 por, 2 kontraŭ, ĉe 4 sindetenoj. La ĝuston de l' voĉdono kontrolis K-doj Ĵanere (3012) k Gliner (Glineur) (469).*

Ekzameninte la dokumentojn, ni deklaras la elekton regula k laŭorde farita.

[1] Legu komunikon pri tio en n-o 330.

En la plend-afero de K-do M. Oholiav (12 824), Novjorko, kontraŭ K-don J. Ker (1781), Denver[1], la Novjorka 3-membra esplorkomisiono metis la aferon antaŭ la membrokunvenon, kiu diskutadis ĝin dum 3 sinsekvaj semajnoj. Ĝi decidis fine per 7 kontraŭ 6 voĉoj[2], ke K-do Oholiav estas senkulpa.

El la leter-interŝanĝo inter esplorkomisiono k la koncernataj K-doj ni notas, ke Wasserman, kiu ricevis la leteron, sur kiu baziĝis la akuzo kontraŭ Oholiav, ne montris tiun leteron al la esplorkomisiono. Rifuzante tion, kio tre simpligus la prijuĝon, li ebligas suspekton.

[1] Vidu n-on 327.
[2] Laŭ alia fonto estis 6 kontraŭ 6 voĉoj, sed la prezidanto, K-do Bonesper (29), havis duoblan voĉon.

Prof. D-ro FERD. SZERENYI
MALGRANDA TERBIBLIO

La plej grandformata eldonaĵo de SAT, presita sur luksa, glata papero, plurkolora; la kartoj klaraj, konvinkaj; la teksto originala, pensiga. Bela studilo por niaj Gek-doj!

Form.: 26×36 cm. Prezo: 1.80 mk. g.

Havebla ĉe la Administracio de SAT, Colmstrasse 1, Leipzig - O - 27 (Germ.)

"LA NOVA EPOKO" DEVAS VIVI!

Kun profunda ĉagreno mi legis, ke nia literatura gazeto estas en grava danĝero, pro perdo de proksimume 400 abonantoj (en Sovetio), k ke ĝi devos ĉesi aperi, se ĝis marto ne montriĝos rezulto de varbagado por novaj abonantoj. Mi pensas, ke tiu ĉi fakto ne nur min ĉagrenas k igas serioze pripensi, sed ĉiujn K-dojn, kiuj komprenas la gravan signifon de l' ekzisto, krome la nepran bezonon de tia organo, kiu prezentas nefalsitan proletliteraturon en esp-o.

Ĉeso de "LNE" signifus elŝiron de l' koro de la evoluanta prolet-literaturo esp-a, k ĉiuj K-doj, legintaj la fulmotondran sciigon en la red. angulo de "LNE", ekkriis rekonsciiĝinte: "LA NOVA EPOKO" DEVAS VIVI!

Mi scias, ke la plej firma bazo por ĝia ekzisto estas sufiĉa kvanto da abonantoj; sekve devas komenciĝi forta agado por varbi novajn abonantojn. Bedaŭrinde en multaj landoj tio ne estas ebla, tie kie "LNE" sub div. pretekstoj estas malpermesita. Plej ofte oni deklaras, ke ĝi povas servi kiel komunista propagandilo k estas vanaj la klopodoj por pruvi, ke ĝi ne havas tian taskon. Sekve varbado povas okazi nur en liberaj landoj. Krome ankoraŭ estas rimedoj por plifirmigi ĝian financan bazon. Oni povas pensi pri plialtigo de l' abonprezo. Kaj kio okazus, se ĉiuj SAT-rondoj, en ĉiuj jaroj, en ĉiuj urboj, en la sama monato aranĝus *kultur-literaturan vesperon* kun bona originala programo ĉerpita el "LNE", k la netajn profitojn de tiuj vesperoj ili pagus en ĝian kason? Ekster Sovetio troviĝas proksimume 1000 lokoj, kie ekzistas SAT-rondetoj, k se la taskon plenumus nur 50%, poste kalkulante la plejan minimumon, ke la profitoj atingas ĉie nur la sumeton de unu jarabono, eĉ tiam konsiderinda sumo trafos la kason de "LNE".

Mi proponas: La monato marto estu la monato de l' originala prolet-literaturo esperanta, dum kiu ĉiuj SAT-rondoj aranĝu, en ĉiu jaro, kulturliteraturan vesperon, ĉerpante la programon laŭeble el esp. originaloj.

La vesperoj celas: a) kulturadon, evoluigon de l' esp. socialista orig. literaturo; b) doni financan bazon por ĝia ekzisto. La neta profito servu por la perioda pliampleksigo de l' literatura organo de SAT. Kie la aranĝo de tiaj vesperoj estas neebla tie en la sama monato la SAT-anoj faru monkolekton samcelan.

Mian proponon aprobos, mi pensas, ĉiuj seriozaj Gek-doj k agados jam en ĉi-jara marto por ne nur savi nian Revuon, sed eĉ havigi al ĝi anstataŭ 16 paĝoj ree 32. Certe la lokaj cirkonstancoj povas modifi mian proponon. Kie ne estas sufiĉe da lab. esp-istoj, la prezentoj estu aranĝataj nacilingve.

Mi petas akcepti mian proponon k fari marton la monato de l' originala esp.-socialista literaturo por SAT.

EMBA.

LA SAT-STELO DUM 1930

1930 jam estas morta, k ni ĉiuj atendis la eble reekbrilegontan 1931.

Vere la pasinta jaro estis tia el malbrilo, malespero, malkonfido k kelkaj aliaj negativaj maloj. La peza vero de tio estas respegulita en la Protokolaro de la X-a SAT-Kongreso en Londono.

Sed inter la tondrobruoj mi rimarkis tre brilegan stelon. Mi dubas, ĉu aŭ ne tiel blindiga stelo antaŭe frapis la okulojn de ni SAT-anoj. Ĝi ankaŭ estas respegulita en la Protokolaro sur paĝo 10: temas pri la ciferoj pri kresko de SAT en Aŭstralio. 1929 — 1 SAT-ano en Aŭstralio; 1930 — 13 SAT-anoj en Aŭstralio.

Tralegu la tutan liston k vi konsentos, ke ĉi tiu malgranda, preskaŭ nevidebla fakto signifas grandan antaŭenpaŝon en la historio de SAT. Bedaŭrinde ne eĉ unu vorto sekvas por klarigi la misteron; dubemuloj tragardu malnovajn SAT-Jarlibrojn. La laboron de iu SAT-ano por revivigi la SAT-arbon en Aŭstralio denaske ĉiam tre malsanan, mi ŝatus konigi al SAT-anio.

Estis maja tago en 1928; iu marista SAT-ano sur brita ŝipo iris kun multaj aliaj laboristoj al la publika parolejo sur bordo de l' rivero Jara *(Yarra)* en Melburno (Aŭstralio). Tie li renkontis konatojn, ĉar ĝi estas lia gepatra hejmurbo, kie li loĝadis multajn jarojn. Alia nekonato rimarkis, ke la marista vesto portis la SAT-stelon. La nekonato demandis pri *ido;* ŝajne iu idisto faris propagandon en Aŭstralio. La rezulto de l' konversacio estis, ke la nekonato interesiĝis pri esp-o.

Estis maja tago en la sama urbo 1929. La tiutaga procesio marŝis al la sama loko k ĝin sekvis la maristo-SAT-ano (nun sur alia ŝipo veninta), k ree samloke li renkontis la nekonaton, kiu jam sciis paroli esp-on. Vizitante poste dum monatoj aliajn aŭstraliajn havenojn, li propagandis la "lingvon de l' internacia laboristaro". En Novzelando li sukcesis mortigi la propagandon de iu idisto en ĵurnalo. Dum la dua halto de l' ŝipo en Melburno nia SAT-ano trovis plurajn lab. esp-istojn, kiuj avide aŭdis pri la granda lab. esp. movado. En antaŭaj jaroj tieaj lab. lernintoj neniam aŭdis pri SAT: Aŭstralio estis pli malpli terorlando de SAT-vidpunkto, SAT-eldonaĵoj ne estis permesitaj k UEA-gvidantoj timis, ke interesatoj faru demandojn pri SAT.

Pli ĝuste ni taksas la laboron

de l' K-do maristo, eksciante, ke li malsaniĝis en Frimantl *(Fremantle)*, survoje al Anglio, k la kuracisto atestis lin ne plu taŭga por maristlaboro. La ŝipkompanio ordonis al li resti en Sidnejo, kie li tuj tre vigle propagandis por SAT. Resume, tiu K-do zorgis pri tio, ke Aŭstralio troviĝu sur la landkarto de SAT. Kaj nun la Protokolaro respegulas tiajn plenentuziasmajn laborojn k atingojn de iu malsana SAT-ano. Kaj nun nia tasko devas esti fortiri el la vicoj de UEA multajn aliajn esp. laboristojn en Aŭstralio. Rimarku la taŭgon de l' marista veno por propagandi por SAT; iru tial al la maristoj, se vi estas havenurbano k sciigu ilin pri nia movado!

Multajn aliajn propagandajn agojn de K-do 7472 (la maristo, kiun mi renkontis k pri kiu temas) mi povus priskribi, sed mi ne estas lia biografo. Sufiĉas diri, ke li nuntempe propagandas surŝipe k en britaj havenoj. Eble ekzistas aliaj SAT-anoj kun similaj kvalitoj. Ĉu ili ne meritas publikan mencion en "S-ulo"?

Elfosanto.

Kiel laboras junaj esp-istoj en Kiev (Sovetio)

Jam kvaran jaron sukcese laboras esp.-rondeto ĉe Kieva 6. Laborlernejo. Ĝi estas unu el la plej malnovaj esp. rondetoj en Kiev. Ĝi ligiĝis kun 38 landoj. Ĝi ricevis pli ol 3000 ekspozaĵojn (afiŝojn, ĵurnalojn ktp.); el Nederlando, Anglio, Germanio, Argentino ĝi ricevis florsemojn plantitajn en la lerneja ĝardeno, el multaj landoj kolektojn da sekigitaj floroj k mineraloj. Okazis standard-interŝanĝo kun germ. ministoj. Ankaŭ stariĝis firma ligo kun Dagestano (USSR), el kie estis ricevitaj valoraj objektoj. Niaj esp-aĵoj k ĉiuj aliaj ricevitaĵoj estis ekspozataj en Kieva Pedagogia Muzeo; kelkaj esp-aĵoj estis montrataj ankaŭ dum Tutsovetia Pedag. Ekspozicio en Leningrado. Tre vigle laboras ankaŭ 2 esp. rondetoj ĉe Infanurbeto "Leninsk" en Kiev. Dum mallonga tempo la kursanoj lernis esp-on k havas nun firman interligon kun pli ol 20 landoj. Por sia internacia laboro la rondetanoj ricevis unuan premion. Gvidas tiujn div. infan-rondetojn K-do D. Viktorov-Ĉeĥoviĉ (5627).

Marist-esperantistoj!

Post vizito al mi de eksterlanda maristo mi ekmeditis pri fondo de Internacia Marist-Esperantista Ligo. Jam funkcias grupo en Antverpeno, sed mi dezirus, ke en ĉiuj gravaj haven-urboj helpu K-doj disvastigi esp-on inter maristoj. Kun ĝojo mi anoncas, ke tiaj helpemaj K-doj estas nun en Amsterdamo, Zandamo, Dortreĥto, Antverpeno, Bristolo, Arĥangelsko k Sundsvall. De printempo ĝis decembro multaj ŝipoj venas en tiujn havenojn (k en Leningradon). Maristoj, kiuj interrilatos skribe kun mi, ricevos respondon. Skribu pri organizaj aferoj, vivkondiĉoj ktp. Adresoj: *Amsterdamo:* SAT-ano 12 715 (Barentzstr. 71, proksime al lignohaveno), K-do J. T. Kaptein, Insulindeweg 49, teretaĝo, orienta kvartalo; *Zandamo:* SAT-ano 15 474, Zuiddyk 306; *Dortreĥto:* K-do P. G. v. d. Plank, Jac. Marisstr. 57 rood; *Antverpeno:* Marista Hejmo, Ankerrui 20; *Bristolo:* K-do W. P. Reed, 626, Fishponds Road; *Sovetio: Arĥangelsko* — Marista Klubo; *Svedio: Sundsvall* — SAT-ano 12 574. K-doj maristoj, helpu nin por plidisvastigi esp-on k notu suprajn adresojn. *12 715.*

TRA LA MOVADO

KRONIKO

Svedio. En Gotenburgo okazis dum nov. k dec. k komence de januaro kursoj laŭ Ĉe-metodo (20 lecionoj), gviditaj de f-ino E. Pähn el Estonio. Unuafoje tiaj kursoj okazis ĉi tie. La sukceso estis granda: 235 p., inter ili 35 ge-instruistoj partoprenis. Nun oni aranĝos daŭrigajn kursojn gvidotajn de lokaj instruistoj. Aranĝinto estis la Esp. klubo de A.B.F. (Lab. kleriga asocio). Oni komencis per publika provleciono k finis per publika ekzameno bonsukcesa. La sukceso de tiaj kursoj multe dependas de l' instruanto: f-ino Pähn meritas plej altan ateston; same la klubo pro sia vigla, ofte penigá laboro. Inter tramistoj okazas 2 kursoj kun 20 p., k 2 aliaj kun nombro da pers. nekonata. (12 286.)

RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Per Balono al la Poluso. La libro pri Andrée k liaj kamaradoj. El la sveda trad. Stellan Engholm. Eld. Eldona Societo Esperanto, Stockholm 1, Fack 698. 411 paĝoj. Form. 15×22. Prezo: 9 sved. kronoj (bindita 11.50 sv. kr.).

La apero de tiu ĉi libro samtempe kun dekduo da nacilingvaj tradukoj estas vere eksterordinara okazo, granda sukceso por Esperantio. La bele prezentita volumo legiĝas kiel plej bela k streĉa romano; kun emocio ni sekvas la ekspedicion perbalonan k la malfacilegan vivadon de l' esploristoj sur la polusa glacio post rezigno je la projektita transveturo de l' poluso, ĝis la fina tragedia morto de Andrée k liaj du akompanantoj. Estas neeble citi ĉi tie el la multaj detaloj de tiu vojaĝo de l' jaro 1897, pri kiuj oni sciiĝis nur en somero 1930 dank' al retrovo de l' taglibroj ĉe la skeletoj de l' pereintoj. Cetere la libro entenas 115 bildojn, inter ili unikajn fotojn, kiuj estas faritaj de la ekspedicio mem k rivelitaj post 33-jara kuŝado en glacidezerto!

Sed por ni sendube la plej grava fakto estas, ke tiu ĉi ampleksa esp. libro, kiu devis esti tradukita, kompostita, presita k pretigita en la mallonga tempo de iom pli ol unu monato, aperas samdate, sekve en la sama rangordo kiel la eldonoj en la naciaj ĉeflingvoj. Fakto de unuaranga propaganda valoro, kiun citu ĉiuj propagandistoj en sia laboro.

La lingvo de l' libro estas bona, k ni ne kontestas la utilon de la malmultaj uzitaj neologismoj, kiel *sledo* (=glitveturilo), *provianto* (provizaĵoj), *komulusaj* k *cirostratusaj* nuboj (meteorol. fakesprimoj). *N. B.*

NIA POŜTO

Respondkupono. — Ĝi ekvivalentas al eksterl. leterafranko, ne pli. Komprenenble aĉetante ĝin ĉe la poŝtejo oni devas pli pagi. *Adm.*

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

The Times & Direct., Bournemouth, 9. 1., 16. 1. (Vojaĝimpres. Perer), *Rahwa Sona*, Tallinn, 22. 1., Sciigoj el Germ. (326), Manif. en Italio.

Priesper. artik. k notojn enhavis:

Signalen, Stokh., 15. 1., *L'Effort*, Lyon, 10. 1., 17. 1., *Le Travailleur du Languedoc*, Béziers, 27. 9., 18. 10., 25. 10. (SAT-kongr.), *ITF-Bulteno*, Amsterd., jan. (rubr.), *Arbeiter-Turn- u. Sportzeitg.*, Biel, 24. 12. (art. kun mencio pri SAT), *The Young Socialist*, Leeds, jan. (Kion rakontas la amikoj de Peĉjo [2] k materialo el "Petro").

Peresper. materialon enpresis:

Le Travailleur du Languedoc, Béziers, 1. 11. 30.

KORESPONDADO

ĈEĤOSLOVAKIO

— Grupo de filatelistoj interŝ. kĉl. PM. Sovetianoj sendu multnombre! Adr.: K-do Franz Kratzer, Flurengasse, 463, *Neustadt a. T.* Resp. garantiata.

GERMANIO

K-do Fritz Gärtner (21 j., vitrofacetisto), *Schönborn, n-o 35* b. Dresden, kĉl, pri ĉ. temoj, L, PK, bfl. Resp. garantiata.

K-do O. Mennicke (naturamiko), Gartenstr. 49, *Wolfen b. Bitterfeld*, kĉl, pri ĉ. temoj, L, PI. Resp. garantiata.

— Esperanto rondeto dez. koresp. kĉl. *Nepre respondos.* Adr.: K-do P. Kurt Schördling, Boyenstr. 2, *Leipzig O 29.*

— 9 lernantoj de Esp. Klubo "Progreso" koresp. kĉl, pri ĉ. temoj, L, PK, PI, gaz. Resp. nepre garantiata. Adr.: K-do Friedrich Betzler, Schulstr. 19, *Aalen/Wttbg.*

— 12 geesperantistoj koresp. kolektive k individue pri temoj el lab. vivo. Certe resp. Adr.: K-do Max Zieles, Buchenstr. 5, *Solingen-Merscheid.*

Gek-doj Erna (21 j.) k Walter Westphal (23 j.), Gerberbruch 20, *Rostock*, kĉl, L, PI,PM.

JAPANIO

Interŝanĝo! — Mi dez. interŝ. ilustritajn presaĵojn, ĵurnalojn, humoraĵojn ktp. kĉl. Adr.: K-do Kitaniĥon — Hioronŝa, Inamimaĉi, *Tojamaken.*

PANAMO

— Tri geknaboj (16, 14, 13 jaraj) volas koresp. letere kun samaĝaj maldekstruloj ĉl. Adr.: Young, Poŝtkesto 214, *Balboa Heights*, Canal Zone.

PORTUGALIO

K-do Zofimo Fernandes Luz, Rua Francisco José Mota, 10, *Setûbal*, kĉl, L, PI, PK.

ENHAVO

	pago
Libertempa vojaĝo en Faŝismujon	153—54
Hispanio — ĝia evoluo de 1923 ĝis hodiaŭ	154
... Iom pli da objektiveco	154
La kolektivigo en U. S. S. R. laŭ Fedor Gladkov	155
La klasbatalo tra la mondo	155—56
Kiu inventis la kinematografon?	156
Pri la konfeso de Mikaelo Bakunin	156—57
Neceso de laborista sennaciismo	157—58
Ankoraŭfoje "Kial senlaboreco?"	158
Mi volas scii	158
Tra Esperantio	158—60
Korespondado	160

Presejo: Neudrag, Leipzig (Germanio)